# EKO

**Esperiga Komuniko**

**Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado**

## Enhavo


- AMO 57 en Ameriko
- AMO 58 en Centra Eŭropo
- Instruista trejnado en Poznano.
- La stato de la Landaj Asocioj



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2019-10 sendita el Budapeŝto la 6an de julio.


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO 57 en Usono (NASK)



"Teknikoj por atingi pli vastan publikon" – jen la temo de la 57a Seminario pri Aktivula Trejnado (AMO). Tio estas nun okazanta en Raleigh, Norda Karolino, Usono, kadre de la somera kursaro NASK, kaj la ligita aranĝo KTF (Kino-Teatro-Festivalo) kun apogo de ESF (*Esperantic Studies Foundation*, Certe venos al diskuto la spertoj ĉe *Duolingo* kaj la laboroj pretigi kursojnsurbaze de pli da lingvoj por vastigi ĝian publikon. Ligita temo estas la kreskanta uzo de sociaj komunikiloj por engaĝi grandajn nombrojn da homoj. TEJO pioniris la koncepton "Amikoj de Esperanto" kaj nun UEA mem lanĉis sian version de la iniciato.

## AMO 58 Ĉaĉak (Kongreso de ILEI)

Inter la 13a kaj 20a de julio okazos la 52a Kongreso de ILEI, nia instruista Ligo. Kadre de tio okazos la 58a AMO-seminario kun la temo: "Esperanto – kiel konigi ĝin, kiel instrui ĝin,". Inter la gvidantoj estos Mirejo Grosjean pri la agado de ILEI kaj UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko – ja konigo de la lingvo. Plia gvidanto estos Stefan MacGill, pri la unika verbsistemo de Esperanto kaj kiel instrui ĝin.



### Landaj Asocioj: la nuna stato. El Jarlibro 2019

Jen resumo pri la nuna stato de la Landaj Asocioj de UEA, egale ĉu aliĝintaj al aŭ ne. Krome ni prezentas bazajn informojn pri la koncerna lando. Ĉu tio formas parton de la Jarlibro 2019, kiu aperos plejparte aŭ tute nur rete. La strukturo por vidigi tiujn informojn en la Asocia Retejo estas ankorau en evoluo, do mi

uzas nian komunikon por disponigi ĝin al vi. Rimarku, ke la prezento unuafoje indikas la daton de lasta ĝisdatigo, do vi havas manieron juĝi la fidindecon de la informoj. Dankon al ĉiu landa aganto, kiu respondis kaj donis konsenton por la aperigo de siaj kontaktinformoj! Ĝuu la rezulton de granda laboro!

## Unika kaj lasta eblo ricevi en Poznano instruistan trejnadon

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI kaj *Edukado.net*, denove kune organizas unujaran instruistan trejnadon.  La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 14-20 sept. 2019, la dua 01-07 feb.2020) kaj intertempan hejman laboradon, retajn taskojn kaj konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj fine pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2020. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado. Legu la alkroĉaĵon por pli da informoj.



Por pliaj informoj kaj aliĝo: <interlin<ĉe>amu.edu.pl> aŭ <ikoutny<ĉe>amu.edu.pl>.

El Berlino, Varsovio kaj multaj aliaj urboj de Eŭropo eblas ayingi Poznanon trajne aŭ buse. Multaj flugkompanioj flugas al Poznano, interalie nealtkostaj. Inter la servataj urboj estas Lviv, Kijiv, Frankfurt, Munich, Alicante, Ateno, Bristolo, Dublino, Edinburgo, Londono, Romo, Stokholmo, Tel Aviv Kopenhago, Parizo (Beauvais),  kaj multaj aliaj. Pripensu ankaŭ la flughavenon de Wroclaw, nur 2 horoj for per trajno.

Foto: SMG                                                                Vortoj: 440.

====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolinguloj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.